

Prezo: 7 €  
www.satesperanto.org  
Julio-Aŭgusto 2019 | n-ro 07-08 (1369-1370)



# *Sennaciulo*

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Koploj por nuntempaj menestreloj

## I

Mi kantas ne pro kantemo,  
nek pro efiko de l' vino,  
sed ĉar kantante la veron  
senpeziĝas la animo.

## II

Promesas eternan vivon  
ĉe predikejoj la pastroj,  
se ĉi-vive ni ŝafide  
submetiĝas al la mastroj.

Kaj mi konsilas al ili  
solviĝi en la racio,  
ĉar vampirojn kaj komplicojn  
solvos la revolucio.

Libero min faras homo,  
libero la lumon portas,  
libero liberon naskas,  
libero, sen vi mi mortas.

Religi', patriotismo  
kaj naciisma doktrino  
estas, kune kun la povo,  
bazaj fontoj de la krimo.

Nacio, himno kaj flago,  
jen patriotisma peko  
tre utila por purigi  
la pugon al si je feko.

Povuloj kreis regadon  
kaj ĝin glate-plate ĝuas ;  
se popolo ĝin atingas,  
povuloj ĝin tuj detruas.

Kaj tion la burĝoj nomas  
fiere demokratio.  
Kaj tial ni laboristoj  
laboru por l' anarkio.

Ni kvardek jarojn eltenis  
diktaturon pleje fian,  
sed eĉ nur vivi prezentis  
agadon revolucion.

## III

Kiu ne vigilis apud  
nuda amatin' en dormo  
tutan nokton sen eĉ tuŝo,  
fremdas al pleja ĝu-formo.

Tion al siaj disĉiploj  
poeto penis instrui,  
sed neniu ĉi plej altan  
plezuron kapablis ĝui.

Vi matene min ignoris,  
tagmeze amon promesis,  
vespere kun mi amoris,  
kaj nokte, ve, min forgesis.

Sed al into mi revenas  
kaj ĉe via spuro restas  
mensogante al mi jene :  
"nur portempe ŝi forestas".

Amon ofte sekvas amo  
eĉ pli granda kaj profunda.  
Ni per amoj lernas ami :  
veni al sindon' ĝisfunda.

## IV

Jen mi venis al la fin',  
kantante pri mia vero.  
Ne juĝu min kun severo,  
se mi ne kortuŝis vin.  
Nur kontraŭ glaso da vin'  
bardoj kantis sian scion,  
mi tamen petas nenion  
kontraŭ montro de la kor'  
por deziri kun fervor'  
juston, sanon, poezion !

Karaj legantoj,

Jen iom malfruanta juli-aŭgusta numero de via *Sennaciulo*. Ĝi estis plejparte pretigita per materialo prilaborita antaŭ la somera paŭzo de la norda hemisfero, sed restis spaco por aldoni jam kelkajn informojn, bildajn kaj tekstajn, pri la barcelona SAT-kongreso. Kaj eĉ ene de la laŭtemaj rubrikoj, du artikoloj (letero el Brazilo kaj Ĝ1, libera valuto) tuŝas aferojn dumkongrese traktitajn. Pri tiu riĉenhava 92a SAT-kongreso vi povos pli detale legi en la venonta numero.

Inter la aferoj aprobitaj en Barcelono estas la loko kaj dato de la 93a SAT-Kongreso. Ĝi okazos inter la 25a de julio kaj la unua de aŭgusto 2020 en Bjalistoko. Provizora aliĝilo, dumkongrese uzita, jam estas alirebla en la SAT-retejo. Pli komplete versio estos dissendita kun la venonta numero de *Sennaciulo*. Pri Bjalistoko endas precizigi, lige kun la ĉefartikolo de tiu ĉi numero, ke tie unuafoje okazis marŝo de samseksemula fiero, kun helpa partopreno de alilokaj aktivuloj, kiuj solidarece kuraĝigis la lokanojn minacitajn pri persekutoj.

Fine, memoru ke restas multa disponebla spaco por kontribuoj al la venonta *Sennacieca Revuo*!

Agrablan kaj verkad-instigan legadon deziras al vi

La Redaktoskipo



La barcelonan kongresfoton faris Pŝemek Wierzbowski

# Enhavo *Enhavo*

## DE MALTOLEREMO AL FAŜISMO

- 4 La persekutado de GLATaj homoj en la mondo
- 7 Kial mi ne portas kompletan
- 7 Letero el Brazilo
- 8 Franko estos aliloke ree entombigita
- 8 La ekstremdekstro estis ĉe ni
- 9 Faŝista flutisto trairas Eŭropon

## TRA LA MONDO: MEZORIENTO

- 12 La arto de la rezistado
- 14 Nadia

## TRA LA MONDO: EŬROPO

- 15 Manojn for de la Dumo de Riga!

## TRA LA MONDO: USONO

- 16 Mortopuno

## SINDIKATISMO TUTMONDA

- 17 Pakistano: reenpostenigu la ok laboristojn de Karaĉio
- 17 Filipinoj: la laboristoj de Holcim postulas justecon
- 17 Pollando: Hutchison Ports reenpostenigu la sindikatan aktivulon Marek Szymczak
- 18 Ni estas kompetentaj por kelkaj aferoj, sed ne por tiu ĉi

## EKONOMIO

- 18 Ĝ1, la libera valuto

## SAT-ANOJ AKTIVAS

- 20 "Elkatakombigo de la E-kulturo" en Hispanio. Brila apero de la Ibera Skolo ekster Esperantujo

## INTELEKTA MEMDEFENDO

- 22 Ĉu la kanario havis "normalajn" rilatojn kun la muso?
- 24 Panoramo pri konspiroteorioj kaj neadismo

## BELETRO

- 2 Koploj por nuntempaj menestreloj
- 25 Usonen!

## 90A SAT-KONGRESO

- 27 Deklaracio
- 27 Gvidrezolucio

## EL LA SAT-ADMINISTREJO

- 26 Kotizoj | Perantoj

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:  
sennaciulo.redaktejo@gmail.com*